Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

7a jarkolekto n-ro 4
aprilo 1987

ATENTINDAĴOJ

09 05 1987 : ESTRARKUNSIDO DE FEL (EKDE 08.30 H.)

09 KAJ 10 05 1987 : PEDAGOGIA SEMAJNFINO (VIDU INFORMILO-N DE APRILO 87 )

23 05 1987 : INFORMTAGO PRI KURSOJ EN DEN HAAG (VD ANTAŬA INFROMILO-N)

**Informilo,** kadro-revuo de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. • Jarabono: 150 fr. • Kontoj: 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 • Respondeca eldonanto (*verantwoordelijke uitgever*): Jan Bovendeerd, Meidoorn 42, B-2510 Mortsel.

E S T R A R O

A. Kunordigado : Ivo Durwael ( prezidanto )
P. Gilsonlaan 5, 2520 EDEGEM 03/440 30 92

Jan Bovendeerd (sekretario- oficiale-)
Meidoorn 42/2 2510 MORTSEL 03/449 50 06

Monique Caesstecker (sekretario - praktike-)
Kerkstraat 66, 9940 SLEIDINGE

B. FINANCOJ + ADMINISTRADO
Roland Rotsaert (kasisto)
Visspaanstraat 97, 8000 BRUGGE 050/33 00 04

Alex HUMET (estrarano)
Terliststraat 12, 2018 ANTWERPEN 03/233 97 32

Paul Peeraerts (direktoro)
Baron D'Hanisstraat 13, 2000 ANTWERPEN 03/234 34 00

C. Informado : Edward Symoens
Putsesteenweg 131 A, 2180 KALMTHOUT 03/666 62 66

D. Intergrupa agado :
Hilde Vaningelgem-Vandriessche
Arbeidstraat 21, 9300 AALST 053/70 50 11

E. Literaturo - Eldonoj :
Christian Declerck
Amerikalei 153/2, 2000 ANTWERPEN

K O M I S I I T O J

- Manlibro de la aktivulo : Marc Van den Bempt
Duisburgsestraat 12, 3030 HEVERLEE 016/20 14 53
- Gazetara Servo : Herman Deceuninck
Villalaan 1 b.4, 1500 HALLE 02/360 99 49
- Rebata Servo : Germain Pirlot,
Kemmelbergstraat 5/3, 8400 OOSTENDE 059/70 87 00
- Propagando + Instruado : Petro De Smedt
Hemelstraat 44, 9330 DENDERMONDE 052/21 26 77
- Libroservo : Erik D'Hondt
Wilgstraat 25 A, 9440 EREMBODEGEM 053/77 44 97



P R O T O K O L O
pri la estrarkunsido de sabato 11 04 1987 en Antwerpen.

Ĉeestas : Paul Peeraerts (PP), Roland Rotsaert (RR) k. Jan Bovendeerd (JB)

Petis senkulpigon : Ivo Durwael kaj Monique Caesstecker

Protokolas : JB

Komenca horo : 08.45 h.

1. La protokolo pri la antaŭa estrarkunsido (14 3 1987) estas aprobita.
2. Nova taskodivido
La prezidanto proponas la estrarkunmeton kiel aperas en paĝo 2 de ĉi numero de INFORMILO
Pri la sekretaria funkcio, JB proponas anonci en la ŝtatgazeto ke sekretarias Monique kaj ke ĝis kiam tiu informo aperos JB restos la oficiala sekretario, sed ke poste Monique ricevu ankaŭ la oficialan funkcion.
Pri tio decidiĝu en la venonta estrarkunsido, ĉar nek Monique nek Ivo povas sin defendi nun.
3. Nova grupo fondiĝis en Oostende.
Oostende volas starti kiel "fakta organizo", nome de " ESPERANTO KLUBO OOSTENDE " kun revuo " LA KONKO "
Kontaktadreso : André D'Hulster, Paul Michielslaan 10, 8400 OOSTENDE
Tel : 059/ 80 06 95
La nomoj de la estraranoj estos komunikotaj.
Por starti ili petas stoketon da kovertoj kaj leterpapero en la nova stilo plus ia financan subtenon - repagotan poste -
Ili ankaŭ petas jam nunan publikigon de sia kursfina festeto.
Sufiĉas ke ili sendu sian programon al PP por ESPERANTO PANORAMA.
Ili planas bone pripensitan propagandon ĉe la marbordo.
RR kontaktos ilin por ekscii ekzakte kion ili bezonas.
4. Sloĝan-konkurso.
Envenis pli ol 160 proponoj. El tiuj 160 nia reklamkonsilistino elektis 10 kaj el tiuj 10, ĵurio konsistanta el Flandroj kaj Nederlandanoj elektis la 2 plej bonajn.
Gajnis la 1-an premion : Dirk De Weerd kun
ESPERANTO : TAAL IN BEWEGING
Gajnis la 2-an premion : S-ro Wylleman kun :
ESPERANTO : LAAT JE VER LEIDEN ( VERLEIDEN)

Kiel jam decidite antaŭe, la 1-a premio konsitas el dek eldonoj de STAFETO.

La estraranoj opinias tamen, ke ankaŭ la dua premio meritas rekompenson. Proponiĝas kaj akceptiĝas 5 eldonoj de STAFETO.

Rilate al tio, ID, kiu partoprenis la Nederlandan kongreson, raportas ke plej diversaj partioj en Nederlando interesiĝas pri komuna eldono de afiŝo. Ilia Kultura Servo petis ke ni sendu projekton ĝis 25-a de aprilo. PP anoncas ke GCA jam okupiĝas pri tiu afiŝo kaj sendos ĝin kiel ebie plej baldaŭ.

5. Kuniaboro kun Nederlando. (raportas ID)

Proponoj estiĝis kun : Edwin Burg (ECN)
De Jonghe (FLE)
Kultura Servo de NEA
Winkel :
Erasmus. Ĉi lasta proponas fari paŝojn por trovi komunecon en Nederlando, tiel ke ni devos trakti kun nur unu persono.

FEL-estraro konsentas.

- Praktike Erasmus proponas :
  - FEL faru longdaŭran planon aŭ almenaŭ planon pri la bezonoj de FEL pri informa materialo en 1988. La plano estu preta ĝis fino 1987.
  - Li provas akiri la samon en Nederlando
  - Ni serĉu komunajn bezonojn kaj poste komune realigu.

Erasmus J.H. (Laan van Oostenburg 40, NL-2271 AP VOORBURG) petis alsendon de la statutoj, regularo de interna ordo kaj mallonga skizo pri la rilatoj inter FEL kaj la aliaj E-o-organizoj, nome ke FEL grupigas ± ĉiuj Esperantistojn, ankaŭ FLE, Fervojistojn, Katoli ktp.

JB sendos ekzempleron de la statutoj, regularo de interna ordo kaj la organigramon, ĉar ĉi lasta ja donas detalan superrigardon de nia landa (Flandra) organizo. PP ankaŭ metis S-ron Eramsmus en la adresaron de INFORMILO, por ke li estus regule informita.

FLE proponis membriĝon pere de la Aliĝilo de FEL (por 5 gld) kaj ebla perado de la Nederlanda gazeto FENOMENO.
Ĉi lasta punkto estos pripensata kaj repridiskutota en la oktobra ĝenerala kunsido por fina decido.

6. Enketo "TEXIER"

Ni kune plenigis la enketon, kiun JB sendos al S-ro Texier post foto-

(daŭrigo je p.13)



## LA ESPERANTO-KOMUNUMO

Okaze de la Jubilea Jaro de Esperanto, ĉie en la mondo organiziĝas diversaj manifestacioj, festaj aranĝoj, studtagoj, kolokvoj, kongresoj. Aperas multaj artikoloj en gazetoj kaj revuoj kaj eĉ la radio kaj la televido interesiĝas pri la Internacia Lingvo.

Sed la Jubilea Jaro ankaŭ estas la okazo mediti pri la Esperanto-problemaro kaj konsideri la lingvan fenomenon el diversaj vidpunktoj : socia, politika, lingvistika, psikologia, kultura.

Mi ŝatas, hodiaŭ konsideri Esperanton el la vidpunkto de la komunumo, kiu subtenas la lingvon, kaj ne de la movado, pri kiu ni plej ofte okupiĝas kaj diskutas. Ni dum kelkaj minutoj koncentriĝu sur la primara donitaĵo de nia problemaro : la Esperanto-komunumo. Temas nur pri skizo, ne pri ellaborita traktado. Mi intencas pli malfrue, en la kadro de la manlibro pri informado kiun mi nun preparas, pli detale analizi ĉiujn aspektojn de nia komunumo.

Mi uzis la vorton "primara donitaĵo", ĉar la aŭtonoma, lingva, diaspora Esperanto-komunumo ja éstas la primara donitaĵo, sen kiu la Esperanto-movado, kiu estas la sekundara donitaĵo, ne ekzistus.

Je la bazo estas Esperanto-sciantaj, Esperanto-parolantaj homoj, kiuj kune, eĉ nekonscie , konstituas komunumon. Nur poste venas strukturoj kaj asocioj kaj organizado.

Origine nur ekzistis eta, nestrukturita lingva-komunumo ĉirkaŭ la iniciinto Zamenhof, vivkapabla embrio, kiu iom post iom kreskas per ĝiaj propraj internaj fortoj, per ĝia propra korpulsado.

Tiu evoluinta komunumo, konsistanta ne nur el diverslingvanoj, divers kontinentanoj, sed el homoj de ĉiuj sociaj kaj intelektaj tavoloj, de ĉiuj aĝoj, ĉiuj opinioj, ĉiuj vivkondiĉoj, el sanaj kaj malsanaj homoj, el blinduloj kaj kripluloj, el diversaj metioj kaj profesioj, estas kaj restas la sola baza donitaĵo, kiun ni bedaŭrinde kelkfoje forgesas profite al la movado... Ĝi estas la pravo de ekzisto de ĉiu lingvo, ĉar kial ekzistus lingvo, se neniu uzas ĝin ? Ĝi estas la mikrokosma socio, kiun ni makrokosme alstrebas realigi.

Kiel ĉiuj komunumoj en la mondo kaj tra la historio, la Esperanto-komunumo klopodas transdaŭri, pluvivi, pluekzisti. Escepte en la sino de kelkdekoj da esperantistaj geedziĝoj, tio ne eblas per propra biologia reproduktado, nur per socia reproduktado, per varbado de novaj komunumanoj.

Tial kreiĝis en ĝia sino organizaj formoj por faciligi kaj amplifiki la disvastigon kaj kreskon de la komunumo kaj ties konsekvadon.
Ju pli varia kaj riĉa estas ĝia interna vivo, des pli abundas la paralele ekzistantaj formoj. De tie fontas la diversaj asocioj, eldonejoj, bibliotekoj, kulturcentroj, teatrotrupoj, akademioj, distraj aranĝoj, kongresoj ktp.Ĉiuj tiuj institucioj kaj aranĝoj estas establitaj de la sama aùtonoma komunumo, ne por si mem, sed por la komunumo, en funkcio de la komunumo, kiu estas la sola nutristino de la movado.La movado ekzistas por la komunumo, ne inverse, kaj kelkfoje ni forgesas tion.
Ni daùre konsciiĝu pri la ĝustaj rilatoj inter la komunumo kaj la movado, kaj tio estas por mi la elirpunkto por klopodi ellabori pli koheran kaj globan Esperanto-politikon, en kiu troviĝas ĉiuj konstituantaj elementoj de la Esperanto-movado.
Se ni akceptas la Esperanto-komunumon kiel primaran donitaĵon kaj elirpunkton de nia esploro, ni sciu plej ekzakte kiuj estas la esencaj kondiĉoj, la viv_aj elementoj por ĝia pluvivado, evoluo kaj konservado.
Neniu Komunumo povas transdaùri se ĝi ne VOLAS transdaùri, eĉ se ĝi posedas plej perfektajn kaj glate funkciantajn organizajn strukturojn kaj instituciojn.Sen interna, profunda kaj forta vivovolo kaj vivopotenco, sen internaj impulsoj kaj pulsadoj kiuj kreas kaj puŝas antaùen, la komunumo ŝrumpas, vivetas kaj verŝajne malaperos. Tiuj vivovolo kaj vivoforto, en normala sana komunumo, fontas el komuna konscio el komuna kredo en "io" supera, io transcenda kaj el solidara strebado al ia komuna celo.
La historio pruvas ke nuraj materiaj interesoj ne sufiĉas por intime kunligi la anojn de kiu ajn komunumo kaj doni al ili la deziron kaj la forton lukti por sia pluvivado.Ili bezonas ion nematerian, nekonkretan ĉar konkretaĵoj, materiaj interesoj tro facile riskas disdividi anstataù ol unuigi.Ni ofte spertas tion en diversaj aliaj komunumoj, ekz en la sino de multnombraj minoritataj komunumoj.
Kio interligas la homojn povas esti komuna kredo en ia vivo futura, en memoro de glora, komuna pasinteco, en iu strebado al liberigo el nelibereco, en iu amo por la patrujo aù nacio, en protekto de komuna kultura heredaĵo, en komuna strebado al io grandioza kiu transpasas



la ĉiutagan vivon.La ĉiutaga vivo neniam mobilizas la homojn...Ekonomiaj kaj politikaj motivoj ne sufiĉas por intime kunligi ilin.La komunumo bezonas ion nevideblan, ne mezureblan sed tamen realan, ion kio povas esti religia aù alia kredo, fido, ion kio metamorfozas individuojn en sociajn personojn, kio forĝas internan koheron kaj finfine konsciigas pri propra identeco, pri aparteno al pli vasta tuto, tiel trarompante la sentojn de izoliteco de forlasiteco, de soleco, sentojn kiuj ĉiuj bremsas kreemon kaj komunan agadon, kiuj kondukas al pasivemo, al nihilisma sinteno, memdetruo, al disrompiĝo.
La Esperanto-komunumo, eĉ se ĝi ne ĉiam konsciiĝas pri tio, posedas internan koherforton, ĝi havas kredon, kiun Zamenhof nomis la Internan Ideon kaj kiu, ankoraù nun, estas pli forta ol ni supozas kaj trovas resonon ĉe multaj homoj.Tion mi almenaù spertis kaj spertas en multegaj kontaktoj.
Ĉu la kreinto/iniciatoro de la Internacia Lingvo ne intuicie, genie pli bone sciis ol multaj el siaj spiritaj idoj, ke por vivteni, la Esperanto komunumo bezonas ian transcendan idealon, kiu por la adeptoj de la Internacia Lingvo povus esti idealo de paco, de homeco,de interfratiĝo, de harmonio, de humanigo de la surtera vivo ? La komuna neùtrala lingvo estas nur rimedo, ne la celo, kaj certe ne la sola rimedo, sed unu de la rimedoj inter multaj aliaj por atingi grandiozan celon. Tiel konsiderite, la Esperanto-movado integriĝas en mondvasta movado alstrebante la saman idealon ; ĝi ne estas io stranga, io nerealisma ; ĝi ne estas izolita ; ĝi estas solidara kun sam-ide-anoj, ankaù neesperantistaj samideanoj.
Ĉu la relativa stagnado de la Esperanto-movado, kiel esprimo de la Esperanto-komunumo, ne kuŝas tie, en nia tro granda akcentado de la sola praktika uzado de Esperanto kaj nia honto, meze de la materialisma okcidenta mondo, akcenti la originan idealon de Zamenhof ? Kio, en la komencaj jaroj kaj ofte ankoraù nun, altiras plej multajn adeptojn de Esperanto ? Ĉu estis kaj estas la espero pri TUJA praktika uzado ? Ĉu en tiu kazo, ili ne prefere ĝisfunde lernu la anglan lingvon kiu hodiaù estas multe pli uzata kaj disvastigata ol la Internacia Lingvo ? Aù ĉu tamen estus la altira forto de la Interna Ideo kiu allogas novajn adeptojn.

Nur tiu interna, ne organizita, ne strukturita forto, mi preskaù dirus biologia pulsado, ebligis la komunumon postvivi la diktatorajn persekutojn, la diversajn internajn skismojn kaj kontraùfluojn, la ĝeneralan indiferentecon, la malamikecon plej diversan. Strukturoj kaj asocioj malaperas, sed la vivoplena komunumo restas kaj se necese kreas novajn strukturojn kaj asociojn.

Kiel ĉiam en la vivo, ni klopodu harmoniigi la du aspektojn de la Internacia Lingvo : la idealistan kaj la praktikan.Unu tute ne kontraùstaras la alian, male, ili estas kompletigaj.

Laùcirkonstance aù laùguste, oni povas akcenti la idealon de intefratiĝo kaj de justeco surbaze de realisma komuna lingvo, aù substreki la neceson de komuna neùtrala lingvo sur fono de internacia interfratiĝo, sed ni evitu forĵeti radikale la idealisman aspekton kiel inspiran forton de la Esperanto-komunumo.

Ni do akceptu kiel premison ke la Esperanto-komunumo posedas la kernan vivoforton kaj la deziron por transdaùri kaj pluvivi.Per adekvataj agado kaj influado, la konsciaj kaj agemaj anoj povas plifortigi kaj gardi vigla la konscion de siaj samideanoj pri ilia identeco, ilia ekzistkialo, ilia komuna strebado.

La interna forto do ne sufiĉas. Ĉi tiu estu plifortigita , vivtenita, kiel ĉiuj internaj fortoj,per la konsciaj anoj de la komunumo . Ĉu ni ne konstatas la saman fenomenon en ĉiuj vivantaj komunumoj ? La Esperanto-komunumo bezonas du kompletigajn agadojn :

1° interne, por daùre konsciigi la komunumanojn , por firmigi la internan koheron, por nutri la kreajn fortojn : organizajn, kulturajn, artajn, literaturajn, sociajn ;

2° eksteren por ke la komunumo transdaùru, plivastiĝu per varbado de novaj anoj.

La interna plifortigo de la Esperanto-komunumo implicas jenajn elementojn.

a) Ĉar temas, unuavice, pri internacia lingva komunumo, ĝia interna kohero kaj pluekzisto baziĝas sur la unueco de la lingvo.Komparu la grandan signifon de la unueca lingvo en ĉiuj minoritataj komunumoj.

b) Ĉiu komunumo prezentas du aspektojn : kvalitecan kaj kvantecan, kiuj ambaù estu prizorgataj laù adekvataj kaj propraj rimedoj.



c) En ĉiuj komunumoj, naciaj kaj internaciaj, agadas kreaj fortoj,al kiuj la komunumo donu la okazon esprimi sin.

ĉ) Internacia lingva komunumo ne vivas abstrakte, ekster la vivanta mondo, sen teritorio.Ĝia teritorio, - kiun la esperantistoj ofte nomas "Esperantujon"-, estas la tuta terglobo, kaj tio estas absolute nova realo en la homa historio.Ĝi plene integriĝas en diversnaciajn sociojn, kaj pro tio, ĝi estas dudimensia : nacia kaj samtempe internacia.Tio donas al ĝi propran statuson, propran identecon.

El tiuj konstituantaj ecoj fontas la ellaborenda politiko, la ekvilibro de la fortoj, la celoj kaj celeroj, la rimedoj, la strategioj.

a) Ĉar temas pri lingva komunumo - ne unuavice ekonomia, politika, ne militarisma, ne religia-, la lingva kono kaj la lingva unueco estu aparte flegataj.La konsciaj kaj plej lingvolertaj komunumanoj konsciigu siaflanke siajn samlingvanojn pri la nepra neceso ĉiam pliperfektigi la lingvokonon kaj defendi kontraù ĉiuj atakoj la unuecon de la lingvo, sen kio la komunumo mem disfalus en diversajn lingvogrupojn kaj la unue alstrebita celo estus nuligita.La komunumanoj ne nur pliperfektigu sian propran ĉiutagan lingvokonon ( per kursoj, legaĵoj, diskutoj, k.s.), sed pliriĉigu, plisupligu la lingvon por ke ĝi servu al plej diversaj uzoj : beletra, scienca, teknologia, arta, filozofia, religia, humanisma...La Akademio, kiu ŝajnas al la Esperanto-komunumo tro pasiva, tro atendema, tro hezitema, tro"akademia", povas ludi en ĉi tiu esenca procezo multe pli gravan, instigan kaj dinamikan rolon.Ĝi eliru el sia ebura turo, meze en la komunumon.

b) La kvalita aspekto de la komunumo, kiu grandparte determinas ĝian eksteran prestiĝon kaj influon, esprimiĝas ne nur en la plejeble alta lingvokono de ĝiaj anoj, sed en la altkvaliteco de ĉiuj ĝiaj produktoj : mensaj, sciencaj, artaj, organizaj, sociaj, internaj kaj eksteraj.Ĉar ni vivas meze de nacia komunumo, ni kvalite integriĝu en tiu komunumo, senriproĉe flegu la nacian lingvon, ne senutile diferenciiĝu kaj evitu ĉion kio pro nezorgemo aù neglekto povas apriore forpuŝi la samnacianojn kaj fermi ilin al niaj mesaĝo kaj argumentoj.

Ni ĉiam denove plifortigu nian memkritikon kaj postulemon, kaj anstataùu ĉiujn formojn de amatoreco kaj proksimumeco per strebado al profesieco kaj altniveleco.

La kvanteca aspekto koncernas la plivastigon, la plilarĝigon de la komunumo.Ĉi tiu plivastigo ne fariĝu malprofite al la kvalito, kiu restu la daŭra zorgo de la komunumo, sed ĝi tamen estas nepre necesa por pluvivi kaj por disponi pri sufiĉe da homfortoj por plenumi ĉiujn atenditajn taskojn.Je la bazo de tiu plivastigo troviĝas la ekstera informado, la instruado, la varbado, la uzado.

c) La kreaj fortoj en la komunumo estas esencaj por vivteni ĝin, por elradiigi ĝian ekziston kaj ĝian valoron al la ekstera mondo kaj por difini ĝian identecon inter ĉiuj aliaj naciaj kaj internaciaj identecoj, por establi propran kulturon, esencan elementon de interna kohero kaj identeco.

Per ĉiuj rimedoj, la komunumo kuraĝigu siajn kreajn fortojn produkti altnivelajn verkojn, por ke ili indus esti konataj ekster la lingvolimoj de la Esperanto-komunumo.La kreemo montriĝu ne nur en belletraj, artaj kaj sciencaj produktoj, sed en la organizado de la komunumo, en la informado, la instruado, la varbado, en ĉiuj aspektoj de la komunuma vivo.La kreemo estas la fermentilo, la vivprincipo de la komunumo. Bedaŭrinde, ne ekzistas magia rimedo nek preskribo por krei kreemon ! Ĉi tiu estiĝas el la plej profundaj tavoloj de la homa estaĵo, sed povas esti stimulita aŭ bremsita, kulturita aŭ malzorgita.Ĝi bezonas agnoskon, konsideron, kuraĝigon, viveblecon.Ĝi estas ligita al la ĝenerala sanstato de la tuta komunumo, en kiu ĝi estas enradikiĝinta kaj el kiu ĝi nutras sin.Ĝi ŝatas entuziasmon, fidon, strebemon kaj malŝatas pasivecon, dormemon, burokratecon...

ĉ) La dudimensiecon de la Esperanto-komunumo ni tre ofte forgesas, kaj ni ne sufiĉe kalkulas je ĝi en niaj planoj kaj strategioj.Ni tro ofte nur vidas unu dimension : la nacian !

La Esperanto-komunumo unuflanke vivas, laboras kaj agas en iu specifa nacia medio, en iu specifa socio, en iu specifa ekonomia kaj kultura kaj politika kunteksto, en kiu ĝi enradikiĝas, el kiu ĝi tiras vivsubstancojn, kaj kies subtenon kaj komprenon ĝi bezonas por plivastiĝi. Aliflanke, ĝi transcendas la nacian socion en sia celo kaj en parto de sia laboro.Ĝi estas pionira en tiu senco, ke ĝi realigas la novan, internacian komunumon, pri kiu multaj homoj parolas, sed kiun ili ne travivas, pro lingvaj malfacilaĵoj, politikaj aŭ ekonomiaj antagonismoj aŭ aliaj konsciaj aŭ nekonsciaj motivoj.



Kion ni nomas "internacia" ofte nur estas apudmetado de la tradiciaj nacioj, kun naciemaj, egocentraj refleksoj kaj reagoj.Ja ekzistas la vertikala varpo de la internacia teksaĵo, sed ofte mankas la horizontala vefto, kiu interne kunigas la diversajn naciajn starpunktojn en nova realo.Vera internacia asocio estas pli ol la adicio de la unuopaj naciaj komponantoj, kaj tiu"pli" konsistigas la veran internaciecon de la asocio, kiu forgesigas la naciajn diferencojn, kiu ne apogas sin sur la nacioj kiel apartaj komunumoj, sed sur nova, internacieca transnacia unueca komunumo surbaze de komunaj, transnaciaj interesoj, problemoj, celoj, postuloj kaj specifaj necesaĵoj. Tia transiro de "nacia" al "internacia" aŭ "transnacia" implicas kaj postulas novan pensmanieron, novajn alirvojojn, kaj samtempe forlason de naciemaj, egocentraj reagoj.

Paralela evoluo historie okazis kaj ankoraŭ okazas en la transiro de loka, regiona, provinca al nacia mensostato, kaj ni ne forgesu ke en tiu evoluo la lingvo ĉiam ludis tre gravan unuecigan rolon.Ĉi tiu evoluo ne okazis tiom nature, tiom memkomprenble, sed pere de homaj, plej ofte politikaj intervenoj.

La "internacia homo" estas kaj restas kaj restu enradikiĝinta en iu nacia grundo kaj kulturo, kiujn li amas, kiuj nutras lin, kun kiuj li estas elkore ligita pere de siaj samnacianoj, samlingvanoj, per komuna pasinteco, samaj revoj kaj seniluziiĝoj.

Sed SAMTEMPE, li sentas sin ligita al aliaj homoj, al samspecanoj, al la homaro trans la naciaj limoj kaj disdividoj.Temas pri natura, historia evoluo de vilaĝo al urbo, regiono, provinco, nacio, federacio de nacioj, inter-naciaro.Bona ekzemplo de tiu evoluo estas la Deklaracio de la Homaj Rajtoj.Ne temas pri la rajtoj de iuj nacianoj, sed de la rajtoj de "la" homoj, de ĉiuj homoj kiuj ajn ili estu.Ĉu ne eblas esti samtempe konvinkita kaj fidela Flandro, Franco, Brito, Germano KAJ Eŭropano aŭ mondcivitano ?

Estas en tiu soci-politika kunteksto ke situas la Esperanto-komunumo, la sola nun ekzistanta, malmultnombra certe, sed sufiĉe kompleta por esti reprezenta de la tuta homaro, la sola kiun komuna, neŭtrala lingvo kunligas.Ĝi estu lernejo pri internacieco, prototipo de pli vasta, pli ĝenerala estiĝanta komunumo, kiu ekster la nacioj, havas siajn proprajn problemojn kaj proprajn solvojn, kun apartaj reguloj, apartaj kodoj.

Se mi iom longe parolas pri la dudimensieco de la Esperanto-komunumo, estas ĉar tro da esperantistoj, eĉ respondecaj gvidantoj, inklinas forgesi ĝin, kaj ĉar ĝi povas esti fonto de studado, de novaj kontaktoj, de nova energio, novaj iniciatoj, nova vivcelo. Ĝi povas indiki la sekvendan vojon por trovi ekvilibron inter nacieco kaj internacieco, bazo de la tuta Esperanto-komunumo.

Sinjoro urbestro, estimataj gesinjoroj kaj karaj amikoj, mi anoncis en la komenco, ke mia alparolado estus nur skizo, nur starto por pli funda pristudado de la traktita temo. Kiel vi scias, niaj kontraŭuloj fakte ĉiam ripetas la samajn argumentojn por rifuzi la akcepton de la Internacia Lingvo :

ĝi estas artefarita lingvo, ĝi ne havas propran kulturon kaj ĝi ne estiĝis el nek apogas sur popolo, do ne disponas pri komunumo.

Por ni, tiu komunumo ekzistas, sed ĝi ne estas tuj videbla kiel komunumo kiu vivas interne de fiksaj landlimoj. Ĝi estas io tute nova, kaj pro tio estas tiom malfacile por eksteruloj kompreni kaj akcepti ĝian ekziston. Ne nur ĝia teritorio estas senlima, sed ĝi konsistas el plej multaj nacianoj, por kiuj Esperanto ne estas la ĉiutaga, sed nur okaza lingvo. Ĝi ekzistas en funkcio de ĉiam pli unuiĝanta mondo. Ni do esploru la esencan signifon de la nocio " komunumo", komparu la Esperanto-komunumon al aliaj komunumoj, entute aŭ parte, ekz. al la juda, diaspora komunumo antaŭ la starigo de la ŝtato Israelo, al la evoluinta kaj ankoraŭ evoluanta flandra komunumo, almenaŭ en kelkaj aspektoj.

En 1984 okazis en Varsovio simpozio pri "Strategiaj demandoj de la Esperanto-komunumo". Kelkaj temoj prilumigas la studobjektojn :

- Rilatoj de la E-komunumo al la neesperantista socio ;
- La socia strukturo de Esperanto ;
- Sociologiaj aspektoj de la E-komunumo ;
- La rolo de la E-komunumo en la homara progreso.

Ni do daŭrigu la sciencan esploradon de la E-komunumo, ĉar kiam ni parolas pri "la fina venko", ni tre konkrete alcelas starigon de internacia komunumo, komunumo de ĉiuj homoj en la mondo, en kiu la neŭtrala lingvo Esperanto ne nur estus lingva interkomprenilo por ĉiuj intergentaj rilatoj, sed ankaŭ ligilo inter la koroj kaj la spiritoj. Revo ? Idealo ? Eble jes, certe jes. Sed ne forgesu, ke sen revo, sen idealo, nenio granda iam okazis en la mondo.!

E.S.



kopiado. Interesitoj povos mendi kopion ĉe JB.

7. LIMBURGO

Esperanto Limburg ensendis tre detalan agadplanon, kiun FEL-estraro aprobas kaj subtenas.

Albert Claesen telefone eksplikis al ID ke en Limburgo fondiĝis provinca organizo, kiu intencas propagandi en la tuta provinco el la centra organizo.

Baldaŭ fondiĝos klubo en Genk kaj verŝajne ankaŭ en Tongeren.

Pro subvenciaj kialoj tiuj grupoj estos aparte menciitaj, sed pri la agado okupiĝos la centra organizo.

Jen la nuna estraro :

- Prezidanto-Propagandisto : Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3538 Houthalen-Helchteren
- Sekretario-kasisto : Albert Claesen, Zonnebloemstraat 7, 3610 Diepenbeek
- Mandatuloj :
  - Hasselt (53 membroj): Marcel Aerts, Lazarijstraat 122, 3500 Hasselt
  - Jef Geraerts, Boendersstraat, 3578 Meeuwen-Gruitrode
  - Josy Hermans, Swinnewijerweg 42, 3600 Genk
  - Beringen (12 membroj): Alfons Beckers, Rozenlaan 5, 3950 Beringen.

Por esti kompleta PP telefonos al Albert Claesen por ekscii kio estu publikigota en ESPERANTO PANORAMA.

8. Teksto de Esward Symoens.

ID proponas enmetigi la tekston de la prelogo, kiun ES faris en Brugo, okaze de la jubilea festo de PACO KAJ JUSTECO (21 03 1987), en la manlibron de la aktivulo.

La manlibro jam estas tiel kompleksa. Tial RR proponas publikigi ĝin

en INFORMILO.

Tiel estu. JB zorgos por la publikigo (jam en la nuna numero).

9. FINANCOJ

RR proponas novan strukturon de la monata superrigardo de la financa situacio kun kompara tabelo pri tri jaroj.
PP priekzamenas la praktikajn eblecojn kaj programigos la komput...on tiel.

10. SONORILO

Al nia registrita letero neniu reagis.
Kion fari nun ?
Proponiĝas komence minaci pri jura persekutado.
Tamen, antaŭ ol draste ekagadi, JB telefonos al Gregoire Maertens kaj Marc Demonty por proponi al ili kunvendaton. Li opinias ja ke verŝajne ili ne tro bone scias kion fari kaj unu atendas reagon de alia por ion decidi. Ili eble tuj akceptos proponon pri dato kaj loko por kuveni.
RR proponas samtempe informiĝi ĉe juristo - ekz. S-ro Piot - pri la plej bone sekvota vojo.

vidu p. 16 malsupre

11. Eldonejo " 't Spectrum "

ID kaj PP havis rendevuon kun estro de la eldonejo 't Spectrum.
Ili aĉetis 250 kursopaketojn, sed ne sukcesis vendi ilin. Ili ne komprenas kiel tio eblas, ĉar ja la vortaro amase disvendiĝas.
Tamen la liberovendistoj ne mendas la studopaketon.
Tial 't Spectrum proponas mem reklami la materialon pere de speciala revuo de Verbond van het Vlaamse Boekwezen. Plie ili volas sendi personon el sia stabo al 100 librovendejoj en Flandrio kaj deponi tie stokon da reklambroŝuroj por distribuado inter la klientaro - ekzemple metante la broŝureton apud la kaso -
Tamen ni, FEL, liveru la broŝurojn , sed sen respondkarto kvankam jes kun indiko ke la studomaterialo estas mendeblа/akirebla en la librovendejo.

La kosto de tiu broŝuro kostus al ni ± BEF 30.000,-.
Kreditbank akceptis sponsori ĝin je 10 %.
Nia investo estus do 27.000 BEF.
Ĉu tiu valorus la investo?
Ĉiu estrarano trovas ke jes kaj ke, eĉ se ĉiu vendejo aĉetus nur unu ekzemleron ( kaj tio estos al ili proponota de 't Spectrum) la plej granda parto de la investo jam estus kovrita. Ni ja povas normale supozi ke, se la materialo troviĝas en la butikoj, ĝi certe



ankaŭ vendiĝas.

Do, propono aprobita.

12. Membreco de Asocio de Eldonistoj

Rilate ĝuste al la antaŭa punkto, 't Spectrum ankaŭ proponis ke ni aliĝu al la Asocio de Eldonistoj. Kotizo : BEF 7.500,-.
Kvankam la aliĝo valoras kadre de nia politiko de ĉeesto, la kotizo ŝajnas al ni tamen iom alta.
Antaŭ ol decidi pri tio, JB proponas atendi la rezulton de provo kiun li faris (-as) kun la eldono " SNOECKX " t.e. jarlibro pri la kultura vivo en la lando kaj eĉ en la mondo. JB nome sendis al SNOECKX la rezultatojn de la Bel-Artaj konursoj de UEA, proponante al ili publikigi tion en la rubriko de Internacia literaturo.
Se SNOECKX jes publikigos tion - kaj tion ni scios je la fino de la jaro - tiam ni povos diri ke ni estas akceptataj en la medio kaj tiam verŝajne estos nia morala devo aliĝi al la Asocio de Eldonistoj.

Do, decido prokrastita.

13. Akcepto ĉe Ministro COENS (laŭ propono de Gregoire Maertens)

ID proponas peti liberigon de profesia instruisto por :
- la lerneja projekto ( projekto Staes)
- lingvoorientiga instrueksperimento
- ?

Decidiĝas atendi la revenon de ID por pludiskuti kaj decidi.

14. Propagando pri la Kadrokurso de Audrey Mee.

Tio jam okazis pere de la antaŭa numero de INFORMILO kaj pere de la nuna.

15. DIVERSAĴOJ

Wim de Rooy, Heideveldstraat 13, NL-5643 CG EINDHOVEN disponas pri komputil-programo (Philips PC) por borsoj ktp por fari propagandon pri Esperanto.

- PP pri financoj-financado

Tiuj membroj kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotion, abono(j)n ktp. ricevis memorigon. Certaj inter ili miris kaj plendis pro tio, ke ili neniam ricevis inviton (aŭ admonon) por pagi. PP sin demandas nun kion fari por ne ofendi ekzemple la grupajn kasistojn.

La grupestroj estas petataj reagi pri tio sendante al ni siajn rimarkojn k/a proponojn.

PP ankaŭ havas certajn malfacilaĵojn por enkasigi ŝuldojn. Certaj grupoj faris mendojn sed ne pagis ĝustatempe. Kion fari ?
Decidiĝas aŭtomate alkalkuli rentumon post 30 tagojn.

- RR proponas alskribi ĉiujn publikajn bibliotekojn - se eble - por instigi al kreo de baza stoko de Esperanto-libroj.
  Aprobite.

Fino : 11.45 h.

JB.

-------------------

LA INTERHOMAJ RILATOJ EN FEL XIV - Ivo Durwael

SCENARO

Vi sendube konas la diversajn speciojn de teatraĵoj : dramo, komedio, krimludo, tragikomedio, familia scenaro, burleskaĵo, parodio ...
T.A. praviĝas la famkonatan frazon de Vondel : "De wereld is een schouwtoneel ; elk speelt zijn rol en krijgt zijn deel ". Ĉu vi ankaŭ jam rimarkis, ke ekzistas homoj, kiuj travivas unu draman situacion post la alia, homoj kiuj ŝajne ĉiam sukcesas, homoj kiuj povas ridi pri ĉiu ajn situacio en la vivo, homoj kiuj dramece reagas en plej simplaj cirkonstancoj, homoj kiuj kvazaŭ enŝlosas sin en sia propra familio ktp.

La tutaĵo de nia preferata psikologia pozicio (ĉu Esperanto aŭ ne) kaj de niaj psikologiaj ludoj difinas nian scenaron. Kaj strange estas, ke ni daŭre ludas la saman rolon, ĉiam refaras la samajn erarojn, ĉiam denove kunfrontiĝas kun similaj agrablaj aŭ malagrablaj situacioj. Sed ankaŭ ĉi foje gravegas la malkovro de T.A. : nur konsciiĝo povas konduki al ŝanĝiĝo : ĉu plifortigi la scenaron, se ĝi plaĉas al ni, ĉu reskribi ĝin se ĝi ne plaĉas.

ID

-----------

daŭrigo punkto 10, paĝo 14

Okaze de telefonado de JB al Gregoire Maertens, li ekscsiis ke ĝenerala kunsido de la administrantaro de SONORILO estas planite en majo proksima. Post tio, ni estos rekontaktataj por nin renkonti.

(aldono de 1987 04 15. JB )